

34-a Jarkolekto * Septembro 2020 * N-ro 118



UBRIQUE
Prilaborita ledo en blanka montaro

Gazeto Andaluza

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.

IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ

REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ

COLABORADORES: Alejandro BURGOS ESCALANTE

Vicente HERRERA COBO

Carlos SPINOLA

Lukas TOCZKI

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio	3
John Lennon en Almerio.....	5
Lingva Angulo: “ <i>Kioma horo estas?</i> ”	9
Poezia Angulo	12
Folioj por Praktikado	14
Rakonto “ <i>Halovena Mateno</i> ”	19
Turismi en “ <i>Ubrique</i> ”	22
Paĝoj pri Nia Historio: “ <i>Esperanto-Tomboj en Andaluzio</i> ”	26
Flamenko: “ <i>El Turroneo</i> ”	32
Fervojista Angulo:	
“ <i>La Tramo al Sierra Nevada en Granado</i> ”	34
Andaluzia Kuirarto: “ <i>Gañotes de Ubrique</i> ”	38
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio:	
“ <i>La Siren-domo en Sevilo</i> ”	40
Krucvortenigo kaj Rebuso.....	43
Solvoj al la pasintaj krucvortenigo kaj rebuso.....	45
Humuro	46

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO




➤ Fondiĝis en Sevilo esperantista entrepreno.

Ĉe la Universitato de Sevilo fondiĝis la entrepreno CIVIENCIA S.L. uzanta la internacian lingvon Esperanto pro la fakto, ke ĝi ne estas superreganta lingvo kaj ene de ĝi ĉiuj povas senti sin liberaj. Fondita de niaj amikoj Vicente Manzano kaj Unika, la celo de Civiencia estas asisti malgrandajn entreprenojn, studentojn, esploristojn kaj asociojn pere de sociologiaj esploroj pri ellaborado de produktoj, datum-bazoj, propagando, ktp.

La ĉeftemo de Civiencia estas “Demokratiigo de la Scienco” (tiel en Esperanto). Civiencia S.L. proponas sciencajn esplorojn kie ne ekzistas monaj aŭ lingvaj bariloj. TTT-paĝo de Civiencia estas:

<https://civiencia.io>



Subskribo de la protokolo por fondi en Sevilo la entreprenon Civiencia S.L.

➤ **Andaluzo prelegis virtuale en Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Kongreso.**

La pasintan 11-an de januaro 2021, kadre de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Kongreso kaj Somerkursaro 2021, nia amiko Carlos Spinola prelegis pri la temo “La Kosma Programo Artemiso”. Ĉi



Carlos Spinola,
Malaga samideano

tiu projekto celas esplori nian sateliton rigardante samtempe la planedon Marson.

Carlos Spinola prezentis la kuntekston de tiu programo, kiel la evoluon de scienco, teknologio kaj spaca industrio en la lastaj jaroj, kune kun la partopreno de privataj kompanioj en la kosma esplorado. Li ankaŭ parolis pri la esencaj punktoj de Artemiso, tio estas la Haloa orbito, kie situos nove dezajnitaj internacia kosmo-ŝipo; la dezajno de reuzeblaj surlunigiloj, la proponoj de lunaj surfacaj esploradoj kaj la planitaj lanĉoj dum la venontaj jaroj.



JOHN LENNON EN ALMERIO

John Lennon (Liverpool 1940) estis brita muzikisto kaj komponisto kiu en la aĝo de 15 jaroj decidis fariĝi rok-muzikisto. En la jaro 1957, kune kun Paul McCartney, li fondis sian unuan muzik-ensemblon *The Quarry Men*. Poste alvenis en la grupon George Harrison kaj Ringo Starr kaj ĉiuj kune fondis en la jaro 1962 la plej faman ensemblon en la historio de la muziko: *The Beatles*. Per siaj komponaĵoj John Lennon esence kontribuis al la sukceso de la ensemblo, famega estis la kanzono *Imagine* (Imagu) de li verkita en la jaro 1971.




John Lennon
1940 - 1980

En la jaro 1966, kiam li estis 26-jaraĝa, li decidis haltigi iomete sian rapidegan sukcesan muzik-karieron. Tiam li rolis kiel aktoro ĉe filmo kiu ŝerce imitis filmojn pri militaj temoj, temis pri *How I won the war* (Kiamaniere mi venkis en la milito) de la direktoro Richard Lester. Li partoprenis en la filmado dum ses semajnoj, tiam li estis for de tiu kirlo de muzik-spertoj kiu estis tiutempe la ensemblo *The Beatles*.

Tiu filmado okazis en la andaluzia provinco Almerio. John Lenno poste asertis, ke tiuj kvietaj semajnoj serenigis lin post tiom da koncertoj, vojaĝoj, ĵurnal-intervjuoj, ktp. Laŭdire, dum la filmado li ricevis nenian privilegion kaj pro tio li devis atendi dum kelkaj horoj inter ĉiu sceno. Oni diras, ke John Lennon trankvile promenadis ĉiutage tra apuda strando en *Zapillo* (Almerio), akompanita nur de hispana gitaro aĉetita de li al almeriz muzikil-faristo.

La 9-an de oktobro 1966, kiam John Lennon fariĝis 26-jara, lia edzino Cynthia kaj Ringo Starr vojaĝis en Almerion por festi tiun datrevenon apud li. John Lennon luis dom-bienon en Almerio kaj tie restis ĉiuj kune dum kelkaj tagoj. Laŭdire, tie li verkis *Strawberry Fields Forever*, belega kanzono kiu naskiĝis post atenta rigardo de ĝardeno en Almerio, kiu memorigis al li tiujn de Liverpool en Anglio.



Afiŝo kaj sceno de la filmo
How I won the war
(1967)

Post tiuj semajnoj ŝanĝoj okazis en la vivo de la brita muzikisto, eble la plej okulfrapa estis la uzo de tiuj rondaj okulvitroj, kiuj depost tiuj semajnoj akompanis lin por ĉiam. Tio ŝuldiĝis al la fakto, ke li devis uzi tiujn okulvitrojn dum la interpretado de la soldato Gripweed en la filmo.

Pri alia rakontinda anekdoto de tiu vojaĝo en Andaluzion de John Lennon pritraktas la hispana filmo *“Amar es fácil con los ojos cerrados”* (Estas facile ami kun okuloj fermitaj) de David Trueba (2013). Tiu filmo rakontas veran historion, tiu de la hispana profesoro pri angla lingvo Juan Carrión, kiu post scii pri la ĉeesto de John Lennon en Almerio decidis viziti lin. Ne estis facile alveni en la britan muzikiston, pro la fermita

etoso de la filmo-produktado. Tamen la profesoro sukcesis kaj li povis paroli kun John Lennon dum kelkaj horoj. Pro la fakto, ke la profesoro uzis kanzonojn de *The Beatles* por instrui la anglan lingvon, li demandis al li pri kelkaj vortoj kiujn la profesoro ne sukcesis kompreni post aŭskultado.



Filmo *Amar es fácil con los ojos cerrados*
(2013)

La hispana profesoro konsilis al John Lennon aperigi la tekstojn de la kanzonoj sur la diskoj mem. Ekde tiam ĉiuj diskoj de *The Beatles*, kaj poste tiuj de multaj aliaj muziz-ensembloj, aperigis la tekstojn de la kanzonoj por pli facila komprenigo.

Oni diras, ke alia *Beatle*-ano George Harrison vojaĝis en Bharaton por ricevi instruojn de mistikuloj. Eble saman sperton John Lennon travivis en Andaluzio.



ALIĜU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- BANKIA
ES57 2038 9814 8360 0059 5212

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2021

HAZTE SOCIO DE LA *Asociación Andaluza de Esperanto*

Si deseas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, aquí tienes tu asociación.

Para hacerse socio contacta con: cordoba@esperanto.ac
Cuota anual: 20 € que se pueden abonar en la cuenta siguiente:

- BANKIA
ES57 2038 9814 8360 0059 5212

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:

- Nombre del nuevo socio.
- Concepto: Cuota 2021

Lingva Angulo

Kioma horo estas ?



Cuando se aprende un nuevo idioma una de las primeras cuestiones que se abordan es aprender a decir qué hora es. En esperanto, por supuesto, también. La pregunta sería *Kioma horo estas?* (¿Qué hora es?). El uso de “kioma” prevé una respuesta con un número ordinal, por lo que lo primero que tenemos que saber es que no diremos: *la unua, las dos, las tres...* sino *la primera, la segunda, la tercera...*

El número en ordinal en Esperanto ya sabes que se forma añadiendo a cada

número la terminación “a” propia del adjetivo, así diríamos *la unua, la dua, la tria, la kvara... la dek dua*. Así que para responder a la pregunta *Kioma horo estas?* Si queremos responder con una hora justa diremos *la unua* o *la unua horo*, para el caso de queramos enfatizar que se trata de una hora en punto diremos: *la unua ĝuste*.

A partir de aquí vamos a añadir minutos.

1:05

La unua kaj kvin minutoj

2:10

La dua kaj dek minutoj

3:35

La tria kaj tridek kvin minutoj

4:50

La kvara kaj kvindek minutoj

También podemos usar los cuartos y la media, si no queremos indicar los minutos:

5:15

La kvina kaj kvarono
La kvina kaj dekkvin minutoj

6:30

La sesa kaj duono
La sesa kaj tridek minutoj

7:45

La sepa kaj tri kvaronoj
La sepa kaj kvardek kvin minutoj

En vez de *kvarono* podemos usar
kvaronhoro o *kvarona horo*.

Y en vez de *duono*: *duonhoro*
o *duona horo*.

¿Cómo decir la hora indicando los minutos que faltan para alcanzar una determinada hora? Es decir ¿Cómo se diría “las cinco menos cuarto”? Es muy simple también.

4:45

Kvarono antaŭ la kvina
Dek kvin minutoj antaŭ la kvina

9:50

Dek minutoj antaŭ la deka

11:35

Dudek kvin minutoj antaŭ la dek dua

12:59

Unu minuto antaŭ la unua

En cuanto al uso de las 12 o de las 24 horas, podemos decir la hora como deseemos. Si optamos por calcular 12 horas, AM o PM, en Esperanto diremos ATM -*antaŭtagmeze*- (pronuncia *atomo*) o PTM -*posttagmeze*- (pronuncia *potomo*), es decir “antes del mediodía” o “después del mediodía”.

Observa estos ejemplos:

Kioma horo estas ?

- *Estas la sepa kaj duono atm.*
Son las siete y media de la mañana.
- *Estas la kvara kaj dek minutoj ptm.*
Son las cuatro y diez de la tarde.

En este último caso también podríamos haber dicho:

- *Estas la deksesa kaj dek minutoj.*
Son las dieciséis horas y diez minutos.

También podemos usar en su forma adverbial *matene* (por la mañana); *vespere* (por la tarde); *nokte* (por la noche).

Veamos ahora qué preposiciones usar para situar algo en el tiempo, es decir, vamos a ver “a qué hora” ocurre algo:

* ***Je la A las ...***

- *Ofte mi manĝas je la dua horo posttagmeze.*
A menudo almuerzo a las dos de la tarde.

Para preguntar a qué hora ocurrirá algo también usamos la preposición *Je*. *Je kioma horo.....?* (¿A qué hora....?)

* ***Ĉirkaŭ la Alrededor de las***

- *Mia patro vizitos min ĉirkaŭ la oka vespere.*
Mi padre me visitará alrededor de las ocho de la tarde.

* ***Ĝis la Hasta las***

- *Mi estos en la parko ĝis la dekunua horo matene.*
Estaré en el parque hasta las once de la mañana.

Poezia Angulo

RIMOJ

XXI

Vi diras: -Kio estas poezio?,
kaj blubpupile vi rigardas min.
Ĉu poezi'? Ĉu vere vi demandas?
Vi estas poezi' !



Gustavo Adolfo Bécquer
1836 - 1870

XXII

Kiel vivas tiu rozo, kiun portas
vi sur via kor' ?
Ja ĝisdate en la mondo ne videblis
sur vulkano, flor'.

XXIII

Tutan mondon por rigardo,
la ĉielo por ekrido,
kaj por kiso via... kion
mi ne donus por la kiso !

En esperanton tradukis Fernando de Diego.
Kun Sopira Koro 1972. HEF Zaragoza.

The screenshot shows the homepage of the Esperanto Association of Andalusia. At the top, there is a navigation bar with links for 'Contactanos', 'Asoc. Andaluzia ESPERANTO', 'Grupos locales', 'Gazeto Andaluzia', 'VENTO', 'Andaluzio, via celo', 'PRI FLAMENKO', 'RINAR', and 'SIGUENOS'. Below the navigation bar is a large group photo of people at a meeting, with the text '¡JK-BADAJOS' overlaid. Underneath the photo are three main content blocks:

- ¿Qué es el ESPERANTO?**: Accompanied by an image of a keyboard, it states: 'Ila sido un sueño desde hace cientos de años que la Humanidad conciera con un idioma para poder entenderse. La posibilidad de aprenderlo es...'.
- ¿Cómo aprender ESPERANTO?**: Accompanied by a speech bubble with the word 'lernu!', it states: 'Se estima que son necesarias unas 150 horas de estudio y práctica para aprender el Esperanto a un nivel básico...'.
- ANDALUZIO, via celo!**: Accompanied by a map of Andalusia, it states: 'ANDALUZIO estas lendo suide de il lispinio kaj de Eŝropo. El la administraco vidovizinto ĝi estas...'.

 The bottom right corner of the screenshot shows a partial link 'Acti Ve a'.

RENOVIĜIS LA TTT-PAĜO DE *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Vizitu: www.esperanto.ac

Tie vi trovos informojn pri kiamaniere lerni Esperanton, vi konos kelkajn agadojn de nia asocio, vi scios pri la manieroj kontakti kun la lokaj grupoj de Andaluzio.

Kompreneble, ni ankaŭ disvastigas la andaluzian kulturon. Sur la branĉo *Andaluzio, jen via celo!* Vi legos pri la ebloj turismi en Andaluzio, ties historio, arto, pejzaĝoj, ktp. Kaj se Vi interesiĝas pri muziko, sur la sekcio *Pri Flamenko*, vi trovos datum-bazon pri flamenkaj kantistoj kaj gitar-ludistoj.

Do, vizitu ofte: www.esperanto.ac

Folioj por Praktikado

Eŭropa strategio kontraŭ KOVIM-19

La 17-an de junio la Eŭropa Komisiono diskonigis sian strategion rilate la lukton kontraŭ KOVIM-19, kiu celas akceligi la esploron, fabrikadon kaj aplikigon de vakcinoj kontraŭ ĉi tiu malsano. Sendube, sekura kaj efika vakcino estas la plej bona respondo por venki la pandemion.

Tamen, la esplorado kaj fabrikado de vakcinoj estas malrapida proceso, kiu, ofte, daŭras 10 jarojn. Pere de ĉi tiu strategio la Eŭropa Komisiono helpas la klopodojn kiuj celas atingi efikan vakcinon kiel eble plej baldaŭ, se eble post 12 aŭ 18 monatoj, aŭ eĉ antaŭe. Kompreneble, oni sekvas ĉiujn procedurojn por atingi sekuran vakcinon el la farmacia vidpunkto. Do, apud esplorado nepras atingi grandajn investojn por fabriki milionojn da dozoj de tiu vakcino.

Eŭropo helpas la esploron laŭ malsimilaj agad-linioj, tiel oni povos kalkuli ne nur kun ununura vakcino, sed kun kelkaj el ili, ĉar estos necese protekti ĉiujn eŭropanojn kiel eble plej baldaŭ.

• **La 17-an de junio.**

Para indicar la fecha en la que algo ocurrió, está pasando o está previsto que ocurra, se usa el acusativo, siempre que no vaya precedido por una preposición. Lo mismo si indicamos el día de la semana. Así por ejemplo: *Merkredon, la 17-an de junio*. Si antes de la fecha aparece una preposición, ej. hasta, después de, antes de... entonces no se utiliza el acusativo. Veamos algunos ejemplos.

- Ili venos en mian urbon la venontan 17-an de junio.
- Ili restos en mia urbo ĝis la venonta 17-a de junio.
- Ili ne venos en mian urbon antaŭ la 17-a de junio.

• **Diskonigi.** *Difundir, dar a conocer.*

Esta palabra está formada por los siguientes afijos y raíz:

- *Dis:* prefijo que da idea de “dispersión, generalización”.
- *Koni:* verbo “conocer”.
- *Ig:* sufijo que expresa la idea de “hacer”.
- *I:* terminación del infinitivo.

Literalmente se podría traducir como “*dar a conocer de manera general*”.

• **Rilate la lukton.** *Con relación a la lucha.*

Podemos decir *rilate la lukton* o *rilate al la lukto*. En este caso hemos preferido usar el adverbio seguido del acusativo por una simple economía en el uso de palabras. Pero ambas formas son correctas. Veamos algunos ejemplos:

- *Rilate al tiu informo mi pensas, ke ĝi estas tute malvera.
Con relación a esa información pienso que es totalmente falsa.*
- *Rilate vian proponon li tuj akceptos ĝin.
Con relación a tu proposición él la aceptará inmediatamente.*

• **Kontraŭ tiu malsano.** *Contra esa enfermedad.*

A veces se usa el acusativo después de la preposición *kontraŭ*, aunque no era el caso en este ejemplo. ¿Cuándo usar el acusativo tras *kontraŭ*?

Podemos usarlo para mostrar que *kontraŭ* indica un movimiento que alcanzó su objetivo. Veamos un ejemplo:

- *La soldatoj pafis sagilojn kontraŭ la malamikojn.
Los soldados dispararon flechas contra los enemigos.*

Es decir, algo se usó en contra de alguien, hubo un movimiento y ese movimiento llegó a su objetivo. En el caso del texto hemos dicho que la vacuna luchará contra la enfermedad: *Vakcino kontraŭ malsano*. No se produce una idea de movimiento, así que no es necesario indicar el acusativo. Por otra parte, hay que indicar que no es obligatorio usar el acusativo para indicar movimiento tras la preposición *kontraŭ*. Por lo que sería totalmente correctas ambas opciones: *kontraŭ la malamikojn* o *kontraŭ la malamikoj*.



KOVIM-19

KOron**V**irusa **M**alsano-19 aŭ simple **Kovimo**

• **La plej bona.** *La / El mejor.*

Recuerda el superlativo **PLEJ** / **MALPLEJ** (*el más / el menos*).

- Mia amiko estas la plej inteligenta.
Mi amiko es el más inteligente.
- Tiu homo estas la malplej alta.
Ese hombre es el menos alto.

Si queremos indicar el grupo con el que se compara usaremos **EN** cuando hablemos de un lugar y **EL** cuando nos refiramos a un grupo.

- Mia amiko estas la plej inteligenta en la universitato.
Mi amiko es el más inteligente de la universidad.
- Mia amiko estas la plej inteligenta el ĉiuj.
Mi amiko es el más inteligente de todos.

- **Daŭri.** *Durar.*

Le sigue el tiempo que se indica en cuanto a duración en acusativo.

- La esplorado daŭris 10 jarojn.

- **Pere de.** *Por medio de*

Recuerda que podemos decir *pere de* o simplemente *per*. Ambas opciones significan lo mismo y ambas son correctas.

- La ŝakludisto venkis pere de taŭga strategio.
- La ŝakludisto venkis per taŭga strategio.

El ajedrecista venció por medio de una estrategia adecuada.

- **Kiel eble plej baldaŭ.** *Lo antes posible.*

La expresión *kiel eble plej...* es similar a la española “lo más... posible”. Por cierto, el esperanto es una lengua viva que se perfecciona cada día, así para la expresión *kiel eble plej rapide* (lo más rápido posible) hay quien utiliza el término *kepre*, a modo de acrónimo de *kiel eble plej rapide* y similar al inglés “asap” (*as soon as possible*).

- **Se eble** = se tio eblas = *si es posible*.

- **Aŭ eĉ antaŭe** = *o incluso antes*.

- **El la farmacia vidpunto.** *Desde el punto de vista farmacéutico.*

Recuerda la preposición EL que significa “de, desde partiendo de un lugar desde el que se sale”. Por cierto, en cuanto al término “farmacia”, si hablamos de una oficina donde se expiden medicamentos sería “Apoteko”, si hablamos de la industria o de la ciencia farmacéutica sería “Farmacio”.

- **Milionoj da dozoj.** Millones de dosis.

Ya hemos estudiado en otra ocasión la preposición partitiva DA. Cuando hablamos de cantidades de algo: miles de, gran cantidad

de, algo de.. utilizaremos la preposición DA. *Milionoj da dozoj, granda kvanto da homoj, iom da pano.*

- **Kelkaj el ili.** Algunos de ellos.

También podríamos decir *Kelke da ili.*

- **Estas necese protekti.** *Es necesario proteger.*

Hemos visto ya más de una vez que si calificamos un sustantivo utilizaremos un adjetivo:

- Alta virino: *una mujer alta.*

Pero si lo que queremos es calificar a un verbo utilizaremos el adverbio.

- Estas necese protekti: *es necesario proteger.*

Recuerda, junto al sustantivo un adjetivo (A), junto al verbo un adverbio (E).

PREVENTILOJ kontraŭ KOVIM-19

		
Purigu viajn manojn	Uzu sapon	Evitu hom-amasojn
		
Uzu taŭgan vizaĝan maskon	Evitu man-salutojn	Uzu desinfektaĵojn

RAKONTO

Halovena Mateno

Ĉiu-nokte mi aŭskultis adajn batojn kaj infanan ploradon, tamen dum la venonta mateno la klarigoj ĉiam estis malsimilaj. En la lifto, kiam mi renkontis miajn najbarulon kaj lian filon, la infano havis unufoje bluringan okulon; aliffoje kelka dento estis rompita; ofte ŝajnis, ke la lipoj de la infano sangis dum la tuta nokto.



Tiam, mi demandis al li:

- *Mia karulo, kio okazis al vi ?*

Tamen, la infano nenion respondis. La patro klarigis al mi, iufoje, ke la infano rul-falis sur la ŝtuparon; aliffoje, ke la kulpanto estis kato, kiu gratis la vizaĝon de la infano; ofte, ke li frapiĝis kontraŭ arbo. Mi pensis, ke estus taŭge denunci lin. Kampanjoj pri ĉi tiu temo en la gazetoj kaj en la televido diskonigis, ke oni devas lukti kontraŭ tiajn deliktojn. Sed ĝuste en la lasta momento, kiam la telefono jam estis en mia mano, mi forlasis tiun ideon. Tiam mi pensis:

- *Ne miksu vin en aferojn de aliaj familioj !*

Poste, kiam mi kroĉis la parolilon, sur la ekrano de la aparato, mi imagis vidi nigrajn literojn kiuj sur fosforeska fono kiuj silente akuzis:

- *Senkuraĝulo !*

Certe mi estis tia kaj baldaŭ mi bedaŭris pri mia senkuraĝeco. Post kelkaj semajnoj, eble post tro forta bato, fatala tragedio okazis. Sur la televido nur estis alia plia informo:

- *Infano 6-jaraĝa forpasis post fali el fenestro. Senkonsolaj gepatroj kulpas la arkitekton, ĉar verŝajne li dezajnis fenestron je alteco ne-taŭga por infanoj.*

Mi konis tion kio fakte okazis, sed mi silentis.

Post kelkaj monatoj mi renkontis mian najbarulinon ĉe la lifto. Mi konstatis, ke ŝi estis graveda. Mi komprenis, ke tiu brutala edzo estis kapabla oferi sekundon da amo por koncipigi alian filon.



Kelkajn jarojn kuris kaj verŝajne ĉio estis malsimila. La patro ne estis tre kompleza al naskita infano, sed feliĉe mi ne aŭdis infanajn plorojn dum la nokto. Kiam la infano ekiris en la varto-lernejon, mi denove renkontis ambaŭ, patro kaj filo, ĉe la lifto kaj ĉio estis en ordo. Mi vidis nek bluringan okulojn, nek rompitaĵojn, nek sangintajn lipojn. Ĉio normala, escepte ke la infano ankoraŭ ne parolis.


Ĉe la lifto mia najbarulo ĉiu-matene diris:

- *La infano jam estas 5-jaraĝa kaj li ankoraŭ ne parolas. La kuracisto asertas, ke neniu problemo okazas. Verŝajne temas pri psikologia afero.*
- *Nu, mia karulo, diru: "pa-ĉjo, pa-ĉjo".*

Tamen la infano nenion diris. Li nur rigardis atente sian patron, per siaj okuloj tiel grandaj kaj malfermitaj, ke ili plenumis lian malgrandan vizaĝon.

Ĉi-matene la infano ekridetis. Tiam la patro, entuziasmigita, kriis:

- *Ek ! Diru: "pa-ĉjo, pa-ĉjo"*.



Kiam mi malfermis la pordon de la lifto por eliri, ili, patro kaj filo, restis malantaŭ mi. Tiam, mi aŭskultis infanan voĉon kiu tutklare diris:

- *Saluton, paĉjo ! Mi revenis kaj nun mi povas venĝi.*



Lukas Toczki

Turismi en ... UBRIQUE (Kadizo)

En la kadiza provinco, ĝuste tie kie unuiĝas la naturaj parkoj *Grazalema* kaj *Alcornocales*, troviĝas la vilaĝo Ubrique (prononcu: *Ubrike*). La apudeco de ambaŭ alt-valoraj naturaj lokoj montras, ke Ubrique situas meze de belega natura etoso, piede de montaro kie abundas oliv-arboj, abioj kaj kverkoj.

Ĉe ĉi tiu zono loĝis ĉasistoj antaŭ 15.000 jaroj, tion provas restaĵoj trovitaj en apudaj grotoj. Sed la unua organizita setlejo en ĉi tiu zono estis la romia urbo *Ocuri*, unuigita per vojo kun la antikva urbo Arundo, nuntempe “*Ronda la Vieja*”. Dum la 3-a jarcento p.K. verŝajne *Ocuri* malaperiĝis iom post iom kaj tiam la loĝantaro iris en apudajn lokojn, pli proksimaj al nuntempa urbo Ubrique.

Kiam la araboj eniris en la Iberan Duoninsulon, oni konstruis proksime al la vilaĝo fortreson, kiu nun estas konata kiel la Kastelo de *Fátima*. Dum sep jarcentoj la kastiliaj reĝoj luktis kontraŭ la arabojn kaj iom post iom la islama teritorio malpliĝis. Dum la 15-a jarcento ĉi tiu zono estis landlimo inter kristana kaj granada (islama) regnolandoj. Tiel, ĉirkaŭ la nuntempa Ubrique stariĝis setlejoj kie loĝis nordafrikaj

berberoj kaj kristanaj mozaraboj. Laŭdire, la nomo Ubrique devenas de la lingvo uzata de la mozaraboj kaj ties signifo estus simila al “*loko kie abundas akvo-mueliloj*”.



Blazono de
UBRIQUE

En la jaro 1485 Rodrigo Ponce de León, kavaliro je la servo de la kastilia reĝo, konkeris la vilaĝon kaj baldaŭ novaj enloĝantoj venis en ĉi tiun lokon. Tiuj novaj Ubrique-anoj sekvis la tradiciajn artefaritaĵojn de la islamaj loĝantoj rilate la marokenan industrion, tio estas: la ellaborado de delikataj, ŝafaj aŭ kapraj kolorigitaj ledoj.

Tiel, dum la 18-a jarcento jam ekzistis kelkaj industrioj kiuj ellaboris ĉi tiujn produktojn. La ekigo de la 19-a jarcento estis terura por la vilaĝo, unue pro epidemio de ĥolero kaj poste pro la atako kaj preskaŭ detruo de la urbo fare de la napoleonaj soldatoj post la invado de Hispanio.

Jam en la 20-a jarcento en Ubrique okazis kelkaj ribeloj de la terkulturistoj kiuj luktis favore sociajn plibonigaĵojn. Nuntempe la ĉefa ekonomia rimedo de la vilaĝo daŭre estas la marokena industrio kaj ties produktoj estas agnoskataj kiel la plej altkvalitaj en Eŭropo rilate la ledan industrion.

Monumentoj

Restaĵoj de la romia urbo *Ocuri*



Ĉi tiuj restaĵoj troviĝas unu kilometron for de Ubrique. Nuntempaj esploroj montras, ke la urbo fondiĝis dum la 4-a jarcento a.K., kvankam la plej gloraj momentoj okazis dum la 2-a jarcento p.K.

Tie videblas maŭzoleo kun enmuraj tomboj. Ankaŭ la murego estas impona.

Monaĥejo de la Kapucenoj

Starigita dum la 17-a jarcento laŭ la deziro de Rodrigo Ponce de León, konkerinto de la urbo por la kastilia regnolando. Temas pri

baroka konstruaĵo en kies interna parto starigas preĝejo kun duonsfera kupolo.



Preĝejo dediĉita al Sankta Antonio

Temas pri la plej antikva religia konstruaĵo, starigita komence de la 16-a jarcento. Ekstere estas videbla tre bela sonoril-muro, kiu nuntempe estas unu el la plej konataj simboloj de Ubrique.

Festoj

La 3-an de majo okazas en Ubrique belega popola festo dediĉita al la Sankta Kruco. La enloĝantaro de la urbo ornamas la stratojn per floroj. Samtempe, oni amasigas asfodelojn

sur la stratoj kaj oni bruligas ilin. Kiam la tigoj de la tiu plankto estas bruligata ĝi ekspluadas kun granda bruo. Laŭdire, ĉi tiu rimedo estis uzata de la enloĝantoj de Ubrique dum la napoleonaj militoj por forigi la invadantojn, pro la fakto, ke tiu sono estas tute simila al pafado. Aliaj asertas, ke ĉi tiu estis popola rimedo por forigi lupojn en la montaro.

Ĉiu strato, placo kaj kvartalo starigas sian propran kandelon kaj ĉiuj estas invitataj trinki, manĝi kaj danci.



Gstronomio

En Ubrique oni preparas bongustan *cochifrito* (juna porkaĵo). Estas tre ofte ankaŭ manĝi farunaĵon, kuiritan paneron kaj supon de asparagoj. Rilate desertojn, famaj kaj bongustegaj estas la *gañote* (vidu paĝon 38-an), spirala dolĉaĵo farita el ovo, faruno, cinamo, sukero, citrono, olivoleo kaj anizo.

Venont-numere *TURISMI EN ...* *VALVERDE DEL CAMINO (Onubo)*



Ĉu vi ŝatas flagojn ?

En Andaluzio estas eldonata la revuo **VENTO**, la sola gazeto en Esperanto pritraktanta veksilologiajn temojn. Veksilologio estas la helpanta scienco kiu studas flagojn. La revuo aperas 3-foje en la jaro kaj ĝi estas libere legebla ĉe:

www.esperanto.ac/vento

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Esperanto-tomboj en Andaluzio

Sufiĉe konata estas la *ZEO*-j, tiuj lokoj, insuloj, ŝipoj, monumentoj, stratoj... kaj eĉ satelitoj, kiuj ricevis la nomon “Zamenhof” aŭ “Esperanto”. Ĉi tiuj objektoj kaj lokoj troveblas tra la tuta mondo kaj eĉ en la spaco, kompreneble ankaŭ en Andaluzio. Ankaŭ oni devas elstari la fakton, ke ekzistas tomboj kiuj sciigas pri la esperantisteco de la forpasintoj, eble ilia celo estis diskonigi nian lingvon eterne. En Andaluzio du el tiuj tomboj ekzistas. Unu el ili troviĝas en la urbo Sevilo kaj la alia en Kordovo.

Ĉe la tombejo “San Fernando” en Sevilo, troviĝas la tombo de Tomás Caspe Cereijo. Ĉu Tomás Caspe aŭ Antolín Colmenar? Tiuj ni, kiuj konis rekte nian samideanon Antolín, ĉiam dubis pri kiamaniere nomi lin. Mi ŝerce eĉ nomis lin “*Edmondo Dantés*”, la Grafo de Montekristo, pro la fakto, ke la vivo de Antolín/Tomás ĉiam memoriĝis al mi tiun heroon de Aleksandro Dumas.



Membroj de la Esperanto-grupo de Sevilo okaze de omaĝo antaŭ la tombo de Tomás Caspe

Tomás León Caspe Cereijo naskiĝis en la jaro 1911. Li lernis Esperanton ĉe socialisma sidejo en Madrido, tie li estis aktiva membro de la sindikato UGT antaŭ la hispana civila milito. Kiam la milito komenciĝis en la jaro 1936 li aliĝis al bataliono de popolaj milicioj, Kiam la kombatoj finiĝis en la jaro 1939 li troviĝis en Valencio kune kun la lastaj restaĵoj de la respublikana armeo.

Malliberigita tiam, la nova hispana politika reĝimo kondamnis lin je 30 jaroj da mallibero. Ĉe prizono li estis ĝis la jaro 1944, tiam li sukcesis fuĝi en El Escorial (Madrido), kiam li laboris kiel kondmanito dum la konstruo de la *“Valle de los Caídos”*, faraona monumento de la frankisma reĝimo por memori la viktimojn de tiu civila milito.



Antolín Colmenar, eksa Tomás Caspe, jam en Sevilo kiel kaŝita socialisto sed aktiva esperantisto.

Tomás iris en Sevilon. Li serĉis urbon kie li estus tute ne-konata kaj tiel komenci novan vivon. Pro tio li ŝanĝis sian nomon kaj ekde tiam Tomás Caspe fariĝis Antolín Colmenar. En Sevilo li laboris kiel tegisto kaj li aliĝis al kaŝita socialisma partio, tiutempe tute malpermesita. Li ankaŭ komencis instrui Esperanton. Verdire, kiu ajn lerta polic-inspektoro povus malkobri lin, tio estas: aktiva esperantisto malaperis en

El Escorial (Madrid) kaj samtempe, aktiva esperantisto komencis disvastigi la internacian lingvon en Seviljo. Tamen, tiutempe policanoj vere ne sciis kio estis tio pri la internacia lingvo esperanto, bonŝance por Antolín kaj por Esperanto.

Tomás, jam Antolín, estis ree aktiva socialisto, li agadis kiel kaŝita delegito en Seviljo de la socialisma partio en Hispanio (PSOE). De tempo al tempo li vojaĝis en Madridon por subteni kontaktojn kun la kaŝita estraro de la partio. Okaze de la nova demokratia reĝimo en Hispanio depost la jaro 1978, kiam la socialisma partio fariĝis la dua politika partio en Hispanio laŭ nombro da deputitoj en la Parlamento, Antolín kontraŭstaris al la estraro de la partio PSOE, gvidita tiam de du sevilanoj: Felipe González kaj Alfonso Guerra. Li preferis enkadriĝi ĉe la plej radikala flanko de la partio, sub la nomo “Historia PSOE” aŭ “PASOC”. Li eĉ partoprenis kiel kandidato okaze de la balotadoj por la Parlamento de la jaro 1982 kiel kapo de tiu antikva sekcio de la socialisma partio PSOE en Seviljo, tamen li ne sukcesis atingi seĝon en la Parlamento.

Antolín estis aktiva esperantisto. Li fondis la Sevilan Akademion de Esperanto dum la 7-a jardeko kaj li estis reprezentanto de Hispana Esperanto-Federacio en Andaluzio. Li ankaŭ partoprenis en la renaskiĝo de de la andaluzia Esperanto-movado en la jaro 1983. En la jaro 1991, kiam li eliris la sidejon de la Esperanto-akademio en Seviljo post la okazigo de kurso, akompanita de Anita, sia edzino, ŝtelistoj prirabis ilin. Li klopodis defendi sian edzinon kaj pro tio li ricevis baton kiu faligis lin sur-teren. Li forpasis en la hospitalo la 16-an de januaro de 1991.

Oni entombigis lin, lia ĉerko kovrita de Esperanto-flago. Sur la tombo ŝtono, aperas gravurita kvin-pinkta stelo kaj meze la litero “E”. Ankaŭ la vortoj *Esperanto* kaj *Jen Pacbatalinto*. Paco por li signifis la unuiĝon de la homaro pere de internacia lingvo kaj progresema idearo.

Membroj de Sevila Esperanto-Asocio, de tempo al tempo, okazigas vizitojn al tiu ununuara tombo en Seviljo kiu diskonigas la internacian lingvon,



Jen detalo de la tombo-ŝtono de
Tomás Caspe en Sevilo

En Kordovo troviĝas la antikva tombejo “*La Salud*”. Verdire tiu nomo montras du kontraŭ-flankajn ideojn: tombejo kaj saneco. La klarigo estas simpla, tiu tombejo estas dediĉita al la Virgulino de la Sano (“*La Salud*” en la hispana lingvo) kaj pro tio jen la nomo.

Ĉe ĉi tiu tombejo estas eble viziti la tombon de Pantaleón Marivela Sanz. Li estis prestiĝa teknikisto de elektro-kompanio en Kordovo. Verŝajne li lernis la internacian lingvon ĉirkaŭ la jaro 1915, nur unu jaro poste li jam estis membro de la estraro de la Kordova Esperanto-Grupo kaj en 1925 li kunlaboris en la organizado de la 5-a Hispana Kongreso de Esperanto.

Pantaleón Marivela forpasis la 3-an de januaro de 1929. Oni entombigis lin en tiu tombejo “*La Salud*” en Kordovo. Sur la tombo-ŝtono, krom nomo kaj biografiaj datumoj, aperas ankaŭ gravuraĵo kun lia portreto. Oni sciigas ankaŭ, ke tiu tombo-ŝtono estas memorajo de liaj kunuloj. Pri kiuj kunuloj temas? Ĉu tiuj de la elektra kompanio kie li laboris? Povus esti, tamen nenia mencio pri kiuj estis tiuj kunuloj aperas sur la ŝtono.



Detalo de la tombo de S-ano Pantaleón Marivela Sanz en
Kordovo.

Maldekstre, sur la gravurajo estas perfekte videbla steleto
por sciigi pri lia esperantisteco.



Tamen, rimarkinda estas la fakto, ke la gravuraĵo montras portreton de Pantaleón Marivela kaj sur la jako aperas simbolo, temas pri kvin-pinkta steleto. Do, tiuj kiuj deziris memori lin pere de tiu tomoŝtono celis montri, ke Pantaleón Marivela estis esperantisto. Do, estas eble supozi, ke la kunuloj kiuj pagis tiun memoraĵon apartenis ankaŭ al la tiama Esperanto-grupo de la urbo Kordovo.

Sur la tomo, ĉiu 3-a de januaro, du floroj estas lasitaj ĉiu jare, unu blanka kaj la alia verda, lasitaj de esperantisto por memori nian malnovan samideanon.

Verdire, estas homoj por kiuj Esperanto estis tiel grava afero en iliaj vivoj, ke ili deziris diskonigi ĝin por-eterne.

J.M.R.H.

Antaŭ kelkaj monatoj ni sciis pri la forpaso de nia zaragoza samideano ANTONIO MARCO BOTELLA. Li estis unu el la plej elstaraj historiistoj de la Esperanto-Movado en Hispanio kaj ofta leganto de nia revuo. Li pace ripozu !



Historia Arĥivo de Andaluza Esperanto-Unuiĝo
Apartado de Correos 611
14080 Córdoba ~ cordoba@esperanto.ac

FLAMENKO

El Turronero



Manuel Mancheño Peña
El Turronero

Manuel Mancheño Peña naskiĝis en *Vejer de la Frontera* (Kadizo) en la jaro 1947. Ĉi tiu kadiza vilaĝo hazarde estis lia naskiĝ-loko ĉar liaj gepatroj, laboristoj ĉe popolaj foiroj, estis en *Vejer* kiam Manuel naskiĝis. Do, li ĉiam asertis, ke li reale naskiĝis en la sevila vilaĝo *Utrera*. Liaj gepatroj vendis nugatojn en la andaluziaj vilaĝoj kaj el tie venas lia arta krom-nomo "*El Turronero*" (la nugat-vendisto).

La flamenka arto ĉirkaŭis lin. Li estis familiano de grandaj flamenkaj artistoj, tiel *Juan Peña* "*El*

Lebrijano" kaj *Gaspar de Utrera*. Nur 12-jaraĝa li jam vendis nugaton en la merkato de la vilaĝo *Utrera* kaj tie li komencis aŭskulti grandajn artistojn kiel *Fernanda* kaj *Bernarda de Utrera* aŭ *Manuel de Angustias*. Alie, kune kun *Bambino*, granda artisto kaj tre bona amiko de *El Turronero*, li komencis kanti, akompanita de la gitaristo *Diego del Gaster*, en la ĉefaj flamenkaj spektaklejoj de Sevilo.

Gaspar de Utrera, kuzo de *El Turronero*, instigis kaj helpis lin iri en Madridon komence de la 6-a jardeko. Tie li kantis apud la famegaj *Camarón de la Isla*, *Pansequito* kaj *Juan Villar*. *Antonio Gades*, fama flamenka dancisto, dungis lin por sia flamenka spektaklo kaj tiel li vojaĝis tra la tuta mondo.

Komence de la 7-a jardeko, li revenis en Madridon kaj li denove akompanis la plej elstarajn figurojn de la tiama flamenko, kiel *Fosforito*,

El Lebrijano. En tiuj jaroj li surbendigis siajn unuajn gramofondiskojn akompanita gitar-lude de *Paco Cepero*.

Ili, *El Turronero* kaj *Paco Cepero*, renovigis tekstojn kaj melodiojn de la plej gajaj kant-stiloj de la flamenka arto, tio estas: bulerioj, tangoj kaj alegrioj. Lia disko “*Huele a Romero*” (1974) estis granda sukceso kaj lia kantaĵo “*Andalucía*” estis preskaŭ himno poste kantita de multaj aliaj.



El Turronero akompanita gitar-lude de *Paco Cepero*

Bedaŭrinde, kiam li nur estis 51-jaraĝa, li suferis subitan sinkopon kiu paralizis la duonon el sia korpo. Li ĉesis kanti kaj iom-post-iom li restis forgesita, kvankam en la jaro 1997 flamenka festivalo en *Utrera*, la vilaĝo kie li loĝis, omaĝis lin. Manuel Mancheño Peña forpasis en la jaro 2006.

*Por ornami vian hararon
buntajn florojn
mi al vi donacos,
por briliĝi vian vizaĝon
kiam vi gracie ekdancos.*

*Eksplodoj silentu, silentu pioĉoj,
kiuj en La Carolina krias tumulte.
Mi ne volas, ke vi estu ministro
ĉar en minej' via patr' mortis sepulte.*

FERVOJISTA ANGULO

La tramo al Sierra Nevada en Granado

En la jaro 1900 la kompanio *Tranvías Eléctricos de Granada* (Granadaj Elektraĵ Tramoj) instalas la unuajn lineojn cele la starigon de tramo servo en ĉi tiu andaluzia urbo. La unua lineo ekfunkciis en la jaro 1904 inter *Puerto Real* kaj *Plaza Nueva*. Iom poste, la ĝenerala direktoro de la entrepreno S-ro Nicolás Escoriza

lanĉis proponon: konstrui fervojan lineon ĝis la pinto de la monto *Mulhacén*, la plej alta monto en la Ibera Duoninsulo.

La projekton ellaboris la svisa inĝeniero Emil Strub, tre fama pro la invento de la det-rela fervojo. La inĝeniero proponis la konstruon de 35-kilometra fervoja lineo de Granado ĝis la pinto de la monto, kiu sekvus fervojan lineon dum 28 kilometroj; 5 kilometroj da dent-rela fervojo; du kilometroj per funikularo kaj fine 500-metra levilo.




Svisa inĝeniero
Emil Strub



La propono estis tre bone akceptita de la granadaj aŭtoritatoj, tamen finfine la projekto ne realiĝis.

Tiu ne estis la ununura projekto por komuniki Granadon kaj *Sierra Nevada*. Pliaj proponoj de aliaj inĝenieroj prezentiĝis inter 1910 kaj 1914 kaj preskaŭ ĉiuj ili antaŭvidis la uzadon de dento-rela sistemo kaj poste funikularo ĝis la pinto. Sed ĉiuj projektoj fiaskis.

En la jaro 1919 oni lanĉis novan ideon: konstrui tramon tra 20,5 kilometroj inter Granado kaj *Charcón* en la vilaĝo *Güejar Sierra*. Tiel, fondiĝis nova kompanio “*Tranvía Ferrocarril de Granada a Sierra Nevada*” (Fervoja tramo de Granado al *Sierra Nevada*). Jam en la jaro 1921 oni ekigis la konstruon de tiu trama lineo.



Por la konstruo de la trama lineo estis necese ofte trabori la monton.

Post kvar jaroj da granda laboro en la jaro 1925 la unua lineo ekfunkciigis. Temis pri tramo inter Granado kaj *Canales*. Post pliaj kvin monatoj da laboro, estis eble iri ĝis *Güejar Sierra*. Oni konstruis 14 tunelojn kaj 21 pontojn. La fina stacidomo troviĝis en *Maitena* kaj ekde tie oni uzis ĉaron por alveni en montaran hotelon.

Ne estis eble fini la tutan projekton ĝis *Charcón* kaj el tie konstrui telferon. La tramo neniam estis profitodona, tiel en la jaro 1931 la laboristoj ne ricevis salajrojn kaj ili strikis. Fine, la hispana administracio alpropigis al si la kompanion en la monato julio 1931. En aŭgusto de tiu sama jaro la trama servo ree ekfunkciis. Post la civila milito naskiĝis nova intereso por iri en la montaron kaj multaj homoj vojaĝis por viziti la monton *Mulhacén*. Do, la ŝtato, proprietulo de la

kompanio, renovigis vagonojn, relojn, ankaŭ oni plilarĝigis tunelojn, oni konstruis novajn stacidomojn kaj ĝenerala la trama lineo pliboniĝis.

Fine de la 4-a jardeko la lineo plilongigis, kvankam la fina telfero ĝis la pinto de la monto neniam konstruiĝis, malgraŭ la aprobo de leĝo en la jaro 1951 kiu ebligis tiun konstruon. Kvankam la tramo ne finiĝis en la sopirata pinto de *Mulhacén* la tramo ofte pleniĝis per ekskursantoj dezirantaj viziti la plej altan monton de la Ibera Duoninsulo.




Elektra tramo inter Granado kaj *Sierra Nevada*

En la jaro 1973 la hispana registaro decidis konstrui grandan basenon, kiu inundus pli ol 5 kilometrojn da tramaj reloj. Do, oni decidis

fermi la kompanion kaj ĉesi la traman servon. La lasta vojaĝo okazis la 19-a de januaro de la jaro 1974.

La platformo tra kie kuris la tramo estis uzata por konstrui novan aŭtomobilan ŝoseon, aliaj lokoj estas hodiaŭ viziteblaj dank' al mallarĝa ter-voĵeto ankoraŭ ekzistanta kaj uzata de ekskursantoj, kiuj povas ripozi en kelkaj el tiuj antikvaj stacidomoj.



*Hispana Amikaro de
Fervojistoj Esperantistaj*

fervojista@esperanto.ac

¡ Colabora con la revista !

El objetivo de *Gazeto Andaluza* es difundir el idioma internacional esperanto en Andalucía y la cultura andaluza en todo el mundo por medio de este idioma.

Si quieres colaborar, hazte socio de la Asociación Andaluza de Esperanto (ver página 8). También puedes participar a través de artículos, noticias, dibujos, etc.

No lo dudes, *Gazeto Andaluza* es una publicación abierta a sus lectores.

cordoba@esperanto.ac

ANDALUZIA KUIRARTO

Gañotes de Ubrique

La receptaro pri desertoj de la andaluziaj vilaĝoj estas senlima. En ĉiuj vilaĝoj kaj en ĉiuj familioj estas eble trovi tipajn kaj malsimilajn dolĉaĵojn, kies ellaborado estas intime ligita al jaraj sezonoj aŭ festoj, ekzemple al la Pasko aŭ al la Karesmo.

En la Montaro de Grazalemo en Kadizo kaj speciale en la vilaĝo Ubrique, oni ellaboras bongustegajn dolĉaĵojn konataj kiel *Gañote* (prononcu: “Ganjóte”). En Ubrique eĉ okazas speciala konkurso kaj tie la vizitantoj rajtas gustumi kaj poste taksi ilin.

Gañote estas aromigita kringo kun spirala formo ellaborita per faruno, ovoj, oliv-oleo, cinamo, citronoj kaj anizo. Estas ankaŭ necese disponi pri kanetoj, ĉar ili estos uzataj kiel muldiloj por atingi tiun specialan spiralan formon.



Jen la ingredientoj:

- Tritik-faruno (500 gramoj).
- Sukero (150 gramoj)
- 3 ovoj.
- Cinamo (1 kulero)
- Anizo (1 kulero)
- Raspaĵo de citrono kaj oranĝo.
- Citron-ŝelo.
- Oliv-oleo.

Jen la ellaborado:

1. Purigu bone oranĝon kaj citronon. Raspu ilin.
2. Ene de bovlo miksu la ovojn, sukeron, la raspaĵon de citrono kaj oranĝo kaj tri kulerojn, sufiĉe abundaj, da oliv-oleo. Miksu ĉion intense.

3. Aldonu cinamon kaj anizon.
 4. Poste aldonu farunon iom post iom. Miksu ĉion malrapide.
 5. Verŝu la tutan miksaĵon sur tablon. Knedu la miksaĵon ĝis la atingo de kompakta bulo.
 6. Detranĉu malgrandajn pecojn da tiu knedaĵo. Per viaj manoj formu longan cilindran bendon kun ĉiu peco detranĉita.
 7. Volvu ĉiun bendon ĉirkaŭ kaneto, por formi spiralojn.
- Nun ni devas friti ĉiun bendon laŭ jene:
8. Verŝu abunde oliv-oleon sur paton.
 9. Aldonu citron-ŝelon kaj ekfritu ĝin. Kiam la citron-ŝelo rostiĝos, demetu ĝin. La celo estas aromatigi la oliv-oleon per la citrono.
 10. Enmetu en la paton ĉiujn spiralajn bendojn, tiuj de la punkto 7-a, eĉ kun la kaneto. Estas necese eviti troan fritadon, tamen la interna parto de la spiralo ankaŭ devas esti fritita.
 11. Ni lasas la fritiĵon sub sorbema kuir-papero. Kiam ĉiu spiralo estas jam malvarma ni povas demeti la kaneton.
 12. Kelkaj receptoj konsilas fine aldoni mielon sur la *gañote*.

Ĉi-recepta vortaro:



Faruno



Ovoj




Oliv-oleo



Sukero



Cinamo



Anizo



Citron-ŝelo

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La Siren-domo en Sevilo

La *Casa de las Sirenas*, (Siren-domo en Esperanto), estas tre konata loko por la sevila esperantistaro. Depost la komenco de nia jarcento tie okazas kursoj de la internacia lingvoj kaj de tempo al tempo renkontiĝoj kaj prelegoj rilataj al Esperanto. Tio ŝuldiĝas al la fakto, ke la Siren-domo apartenas al la Sevila Urbodomo, kiu ekfunkciigis kulturalan centron en ĉi tiu konstruaĵo. Inter tiuj kulturaĵoj Esperanto ĉefrolas.



La Siren-domo estas palaceto konstruita laŭ franca stilo, kiu stariĝas meze de la *Alameda de Hércules*, tre konata placo en la centro de la urbo Sevilo. Estas eble trovi malsimilajn opiniojn pri la origino de la konstruaĵo. Iuj asertas, ke franca princino, *María Letizi Wyse Bonaparte*, retiriĝis al la urbo Sevilo kaj ŝi ordonis la konstruon tie de palaco simila al tiuj ekzistantaj en Parizo. Laŭ ĉi tiu versio la barono *Hausman* estus la arkitekto. Ĉi tiu nobelo estis ankaŭ la respondeculo de la tuta renovigo de la franca ĉefurbo, ordonita de Napoleono la 3-a.

Alia versio, eble plej kredinda, asertas, ke la Markizo de *Esquivel* mendis la starigon de palaco ĉe la *Alameda de Hércules*. En ĉi tiu kvartalo tiutempe renkontiĝis aristokratoj kaj mon-havantoj. La nomo pripensita por tiu vilao, pli simila al palaceto, estis "*El Recreo de la Alameda*" (La Plezur-domo de la Aleo). La arkitekto ekigis sian laboron en la jaro 1861 kaj ties konstruo daŭris tri jarojn. La domo estas 1.200 kvadratajn metrojn granda kaj meze de ĝi troviĝis granda ĝardeno konstruita laŭ la franca stilo. Ĉe la pordo oni instalis du grandajn sirenojn kaj aliajn malgrandajn sur la pordo, pro tio la domo baldaŭ estis konata kiel "La Siren-domo". Du malgrandaj konstruaĵoj stariĝis apud la centra domo, uzitaj kiel ĉeval-stalo kaj var-tenejo.



La Siren-domo, ruinigita, antaŭ la rekonstruo en la jaro 1992.

La markizo loĝis tie nur dum ses jaroj. Li poste vendis ĝin kaj tra la jaroj ĝi estis la hejmo de malsimilaj familioj, ĝis kiam ĝi restis tute forgesita kaj forlasita ĝis la komenco de la 6-a jardeko pasint-jarcente. Tiam, tute ruinigita, multaj homoj profitis tiujn restaĵojn por aliaj konstruoj, inter ili la sirenoj mem, uzitaj por ornami alian foran domon.

En la jaro 1992 la Siren-domo estas aĉetita de la Sevila Urbodomo, kiu ekigis la taskojn por rekonstrui ĉi tiun belegan palaceton

Jam rekonstruita ĝi estas la sidejo de kultura delegacio de la Urbodomo mem kaj tie okazas prelegoj, ekspozicioj, koncertoj, ktp. Inter tiuj kulturaj agadoj ankaŭ troviĝas la okazigo de Esperanto-kursoj kaj la oficiala sidejo de la Esperanto-movado en Sevilo.

Kiel ĉiu palaco konstruita, detruita kaj rekonstruita, kie loĝis malsimilaj familioj ankaŭ pri la Siren-domo oni rakontas legendojn kaj misterajn okazintaĵojn. Kelkaj ĉeestantoj asertas, ke estas eble aŭdi tie sonojn similajn al fora pied-premado, tamen tio ne estas stranga, se ni scias, ke temas pri antikva palaco kie la lignaĵo estis uzata dum konstruo kaj rekonstruo.

Verŝajne la plej konata legendo de la Siren-domo estas tiu pri la fantomo de la filo de la familio *Portilla*. Laŭ ĉi tiu rakonto tiu familio loĝis en la palaco dum kelkaj jaroj. Temis pri familio kies filo loĝis ĉe la Siren-domo tute izoliĝita, li neniam eliris sian ĉambron. Laŭdire, la kialo de tiu izoliĝo troviĝis en la fakto, ke tiu junulo estis sam-seksema, en tiu tempo temis pri terura peko laŭ la kristana eklezio kaj la sociaj kutimoj. Iuj asertas, ke la familio izoligis lin en la ĉambro, tie li loĝis man-ligita dum la tuta tago. Tamen, aliaj asertas, ke estis tiu junulo mem kiu mem-puniginte pro tiu "*terura peko*" preferis izoligi sin.



Oni ne scias kiamaniere la junulo forpasis, tamen tutcerte tio okazis ĉe la Siren-domo, la ĉiama loĝejo de la junulo dum lia mallonga vivo kaj ankaŭ dum lia eterna morto, ĉar laŭdire ties fantomo ankoraŭ troviĝas tie.

Krucvortenigmo

	1	2	3	4	5	6	7	8
A								
B								
C								
Ĉ								
D								
E								
F								

HORIZONTALE


- A. Malgrava, sen-valora, ne konsiderinda.
- B. (*Inverse*) Rilato inter du aŭ pluraj personoj kiuj, reciproke, scias unu pri la aliajn.
- C. Prefikso montranta, ke la grupo konsistas el ambaŭ seksoj. ■
(*Inverse*) Prefikso signifanta *du*. ■ Persona pronomo.
- Ĉ. Sufikso esprimanta pasivon por ankoraŭ ne okazinta procezo. ■
(*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Sesdeko de horo.
- D. (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Ligiteco inter du aŭ pluraj aferoj. ■
En la aŭtomobiloj de Kostariko.
- E. Sufikso esprimanta pasivon dum plenumiĝo. ■ Prefikso montranta
ripeton de ago. ■ Mallongigo de internacia lingvo.

F. (*Akuzative kaj inverse*) Ina ido, rigardata rilate al la aliaj idoj de la samaj gepatroj.

VERTIKALE

1. (*Sen la lasta vokalo*) Enloĝanto en ĉefurbo de sudamerika ŝtato.
2. Salo aŭ estero de acido.
3. (*Inverse*) Prefikso montranta grandecon. ■ Laŭ la romianoj kvindek. ■ Finaĵo de akuzativo.
4. (*Inverse*) Forte kolerigita.
5. (*Sen la lasta vokalo*) Tri- aŭ kvar-pieda seĝeto sen brakoj kaj dorsapogilo.
6. Prepozicio. ■ En la aŭtomobiloj de Norvegio. ■ La unua.
7. (*Sen la lasta vokalo*) Grupo de arbustoj kun longtubaj floroj kaj kun fruktoj ofte tre venenaj.
8. (*Adjektive*) Insekto tre laborema.

Rebuso



- Tiel laborema kiel _____ .

- Solvo al la pasintnumera Krucvortenigmo.

	1	2	3	4	5	6	7
A	M	O	N	A	Ĥ	O	J
B	I	■	O	N	I	■	A
C	R	E	T	O	R	I	K
Ĉ	A	M	I	■	U	I	T
D	K	A	N	A	R	I	A
E	L	■	D	O	G	■	D
F	O	R	A	T	O	R	O

- Solvo al la pasintnumera Rebuso.

Urbo vizitata de milionoj da homoj:

NOVAJORKO

N + Inverse AVO do OVA + O + J + OR' + Ko

Ĉu la revuo plaĉas al Vi? Ĉu Vi ŝanĝus ion?

Ĉu io aldonebla? Ĉu forviŝi ion?

Komentu kaj proponu per jena kontaktilo:

cordoba@esperanto.ac



HUMURO

La numero 119-a de nia revuo (Decembro 2020) aperos fine de la monato marto 2021.

cordoba@esperanto.ac

GAZETO ANDALUZIA
Apartado de Correos 3142
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
 Juan García del Río
 Carlos Spinola
 Alejandro Burgos Escalante
 Juan Díaz Casado

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
 cordoba@esperanto.ac

TTT-paĝo: www.esperanto.ac

 www.esperanto-andalucia.info

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

